

Wilhelm von Humboldt

Pasintan mardon mi skribis pri Alexander von Humboldt, ĉar pasintjare oni festis la 250-an datrevenon de lia naskiĝo. Kiel mi diris, ankaŭ lia frato, Wilhelm von Humboldt, estis grava homo. Pro tio mi parolas hodiaŭ pri li, kvankam ne estas iu ajn festo de datreveno. Li vivis de 1767 ĝis 1835.

Pri tiu germana sciencisto, politikisto kaj diplomato vi povas legi en la E-Vikipedio sufiĉe da detaloj. Tamen mankas ĝuste la plej gravaj – tiuj pri lia laboro kiel lingvisto kaj pri liaj ideoj en la kampo de edukado kaj instruado.

Do mi prezentas kelkajn informojn legeblajn en la germanlingva Vikipedio – parte tradukitajn kaj parte rezumitajn.

Kune kun sia frato Alexander von Humboldt, li estas unu el la grandaj, daŭre influaj personoj en la germana kultura historio. Dum Alexander malfermis novajn horizontojn al ter- kaj naturscienca esplorado, la prioritatoj de Wilhelm estis la okupiĝo pri kultursciencaj interrilatoj, precipe de edukaj problemoj, ŝtata teorio, analiza konsiderado de lingvo, literaturo kaj arto.

Ekde 1820 ĝis lia morto li loĝis en palaco, kiun li konstruigis proksime al Berlino laŭ la projekto de la plej fama germana arkitekto de la 19-a jarcento (Karl Friedrich Schinkel).

Dum la dekkvin jaroj kiujn li vivis en sia palaco Humboldt okupiĝis ĉefe pri lingvaj studoj. La materialojn por tio li parte estis kolektinta dum siaj vojaĝoj, parte ricevis en sia vasta korespondado, kaj parte estis ĉerpitaj el la materialoj de la esplorvojaĝoj de lia frato Alexander.

Krom la fremdaj lingvoj lernitaj dum sia junaĝo, Humboldt estis lerninta la anglan, italan, hispanan, eŭskan, hungaran, ĉeĥan kaj litovan. Liaj sciencaj studoj koncentriĝis pri la indiĝenaj lingvoj de Latinameriko [...], la kopta, la antikva egipta, la ĉina, la japana, sanskrito, la birma, la havaja kaj la malnova javana. Wilhelm von Humboldt estis unu el la fondintoj de la eŭska lingvistiko. Rezulte de liaj studoj pri amerikaj indiĝenaj lingvoj li ellaboris ĉirkaŭ tridek pli-malpli ampleksajn gramatikojn kaj vortarojn.

Tamen verŝajne li estas plej konata pro sia t.n. “idealo pri edukado”, kiu baziĝas sur la konceptoj de “aŭtonoma individuo” kaj “mondcivilitaneco”. Laŭ li estas en la universitato ke devas esti kreataj aŭ kreiĝi aŭtonomaj individuoj kaj mondcivitanoj. Aŭtonoma individuo estas tiu kiu per uzado de sia racio akiras memdeterminon (aŭtonomecon) kaj maturecon, kaj la mondcivilitaneco estas la kolektiva ligilo, kiu ligas la aŭtonomajn individuojn, sendepende de ilia socia kaj kultura sociigo. “Iĝi mondcivitano signifas pritrakti la grandajn demandojn de la homo: strebi al paco, justeco, interŝanĝo de kulturoj, al aliaj rilatoj inter viroj kaj virinoj kaj al alia rilato kun la naturo.” La universitata edukado ne devas rilati al profesioj, sed esti sendependa de ekonomiaj interesoj.

“Akademia libereco” unue signifas la eksteran sendependecon de la universitato. La universitato devas eviti influojn de la ŝtato, ĝi devas esti aŭtonoma. Aldone akademia libereco postulas internan aŭtonomecon, kiu inkluzivas liberan elekton de studfakoj, liberan organizadon de la studoj kaj liberan defendon de opinioj kaj instru-metodoj.

Laŭ la anglalingva Vikipedio la “Humboldt-a idealo pri edukado” estis enkondukita ne nur en Germanio, sed ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple Usono kaj Japanio.

Dum tiu idealo estas konata de la ĝenerala klera publiko en Germanio, alian gravan ideon de Wilhelm von Humboldt konas nur tiuj kiuj interesiĝas pri lingvistiko. “Li estas konsiderata kiel la unua eŭropa lingvisto kiu perceptis la homan lingvon kiel sistemon regatan de reguloj anstataŭ esti simple kolekto de vortoj kaj frazoj kunigitaj kun signifoj. Tiu ideo estas unu el la fundamentoj de la teorio de Noam Chomsky pri lingvo. Chomsky ofte citas Humboldt, kiu priskribis la lingvon kiel sistemon kiu ‘faras senfinan uzon de limigitaj rimedoj’, kio signifas ke oni povas krei senfinan nombron da frazoj uzante limigitan nombron da gramatikaj reguloj.” (Anglalingva Vikipedio)